**Agadraporto 2024 de la Federacio Esperanto-Bretonio / Fédération Espéranto-Bretagne**

La Federacio Esperanto-Bretonio organizas komunajn agadojn por la lokaj asocioj de Bretonio:

**Lokaj grupoj aŭ kontaktoj** en

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Lannion, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec, Rostrenen.
- Finistère: Douarnenez, Morlaix.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo, Pleugueneuc.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique : Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint Aignan de Grand lieu, Couëron.

Notindas ke la asocioj de departemento Loire-Atlantique ne membras en la federacio laŭstatute ĉar estas en alia administra regiono sed ekzistas regula kunlaboro kun tiuj lokaj kluboj, inter alie pri organizo de prelegturneoj.

**Membraro**: ĉirkaŭ 100-150. Inter ili estas 63 membroj kiuj membras ankaŭ en Espéranto-France, el kiuj plej multe partoprenas al la komuna kotizo de la klubo kun Espéranto-France (Armor Espéranto, Espéranto-Plouézec kaj Espéranto Rennes).

**Agoj de la federacio:**

Renkontiĝo en Pluezek dum semajnofino 6-7 aprilo. Vegetara Esperanto Renkontiĝo 13-14 de julio 2024 en la ekologia loko "Terre et Partage" Paimpont, organizita de Nikol Rizzon. Semajnfino en St-Aignan de Grandlieu., 4an – 5an de oktobro 2024.

Eldono de la federacia bulteno Verda Triskelo kun 2 numeroj dum 2024 danke al la teamo de Hélène, Chantal kaj Josette.

Retejo: http://bretonio.esperanto-france.org/ administrantoj: Bert kaj Xavier.

Reta diskutlisto de la membroj gastigata de Esperanto-France: bretonio@esperanto-france.org kun pli ol 200 abonantoj, administrata de Xavier. La diskutlisto ricevis pli ol 100 mesaĝoj dum 2024.

Retaj kunvenoj de la komitato por la administrado kaj organizo de la membro-kunveno.

Jara kunveno okazis en Saint-Quay-Perros, la 17an de marto 2024 , kun 24 ĉeestantoj 1 vizitanto, Trigo Peng 1 prokuro kelkaj pliaj personoj kiuj alvenis dum la kunveno por ĉeesti la programon omaĝe al Gaby posttagmeze.

Kursoj kaj konversaciaj rondoj en pluraj urboj kaj vilaĝoj de nia regiono.

Eblas legi pri aliaj agadoj de lokaj asocioj en la lastaj numeroj de Verda triskelo en la retejo de la federacio.